

TEA-BULTENO

4ª JARO | DECEMBRO 2001 | NUMERO 10

AGENDO

1	S	
2	**D**	
3	L	
4	M	Ni parolu Esperante!
5	M	
6	Ĵ	
7	V	Kartluda vespero
8	**S**	
9	**D**	
10	L	
11	M	Ni parolu Esperante!
12	M	
13	Ĵ	
14	V	Tago de la Libro
15	S	
16	**D**	**ZAMENHOF-TAGO EN TRIESTO**
17	L	
18	M	Ni parolu Esperante!
19	M	
20	Ĵ	
21	V	**KRISTNASKA FESTO**
22	S	
23	**D**	
24	L	
25	**M**	
26	**M**	
27	Ĵ	
28	V	**JARFINA FESTO**
29	S	
30	**D**	
31	L	

Al vi ĉiuj Bonajn Festotagojn!

Zamenhofa Tago

Esperantistoj tra la tuta mondo tradicie festas ĉi tiun tagon per renkontiĝoj, kunvenoj kaj diversaj agadoj por honori Lazaro Ludoviko Zamenhof, la elpensinton de nia lingvo. Do, jen nia programo:

Vendredon la 14an de decembro, je la 20ª horo ĉe nia sidejo, ekspozicio pri esperantaj libroj. Sekvos legado de versaĵoj kaj prozaĵoj rilataj al nia Majstro.

Dimanĉon la 16an planita estas vizito de la Ekspozicio "Koloroj ĉe sespieduletoj", ĉe Urba Mara Akvario. Temas ĉefe pri elmontrado de ekzempleroj el la entomologia kolektaĵo de la Muzeo pri Naturhistorio, plus kelkaj raraj vivantaĵoj, speciale breditaj de la Muzeo mem cele al repopolizado. Ĉeftemo la koloro, kiun oni pritraktas laŭ ĝiaj diversaj funkcioj: mimetismo, seks-allogo, ktp. Eblos vidi insektojn de eŭropaj specioj, papiliojn kun mirindaj desegnaĵoj, koleopterojn el Afriko kaj multajn aliajn naturajn mirindaĵojn.

Rendevuo antaŭ la Akvario - Riva N. Sauro 1 - je la 10ª horo. Sekvos bu fedo en TEA-sidejo.

KRISTNASKA ...

Vendredon la 21an de decembro, vi estas varme invitataj ĉe **TEA**-sidejo por amika kuntostado. Ankaŭ ĉijare Kristnaska Paĉjo vizitos nin por persone transdoni kelkajn donacetojn. Do, vi estas atendataj ekde la 20ª horo.

... KAJ JARFINA FESTOJ

Vendredon la 28an de decembro, ni kune festos por adiaŭi la 2001an jaron kaj bonvenigi la 2002an . Ni atendas vin, multnombrajn!

Bondeziroj

Festotagoj ja ĉeporde. Bela kutimo ankoraŭ rezistas: sendado de bondezirkartoj! Simpla bildkarto kun kelkaj vortoj kaj via subskribo ĉiam donas grandan ĝojon al ricevanto, ĉar ĝi estas atestilo de via sincera amikeco. Tiu ago kostas malmulte (aĉeto de karto+poŝtmarko), sed multon donas. Ĉe TEA-kasisto je via dispono buntaj kaj gajaj bondezirkartoj kristnaskaj kaj novjaraj.

Grava atentigo!

Pro plialtigo de poŝtaj elsendokostoj, kun bedaŭro ni informas vin, ke la Bulteno ne plu aperos ĉiumonate, sed ĉiun duan monaton. Do, ekde januaro 2002 estos publikigita programo valida por du sinsekvaj monatoj. Ni esperas je via bonvola komprenemo, certaj ke ĉi tiu decido tute ne bremsos aŭ malhelpos vian partoprenemon en niaj programoj.

Tea-estraro